



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

NUDA INTER LUPOJ

La romano el GDR

prezo 12,- GM

Mendu ĉe.....
Libroservo
Ludwig Pickel

Eldonanto/Herausgeber

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 24/1974 10 jul 1974
Aperas ĉiusemajne

UK-novaĵoj el Hamburgo

Kongresa libro

La kongresanoj ricevis intertempe la kongresan libron kun la programo kaj adresaro de la aliĝintoj. La libro i.a. enhavas:

La salutvortojn de federacia kanceliero Helmut Schmidt, de la urbestro de Hamburgo, Peter Schulz, de la honora protektanto, Helmut Rohde, federacia ministro pri ŝtato kaj scienco, kaj de la iama kanceliero kaj Nobelpremiito pri paco, Willy Brandt, artikolon de d-ro W. Bormann pri la kongresa lando, skizon pri la historio de Esperanto en Germanio plume de Ulrich Lins kaj artikolon de Felix Epstein kun la titolo "Esperanto en Hamburgo".

Gravaj por la kongresa laboro estas la resumoj de raportoj prezentitaj al la du ĝenerala kunvenoj de UEA: Plifortigo de la landaj asocioj de d-ro W. Bormann kaj Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo de prof. d-ro Ivo Lapenna.

Aldonita estas la Raporto de la estraro de UEA pri la agado de Universala Esperanto-Asocio dum la jaro 1973/74.

Oficiala reprezentitigo

Altzanga oficisto el la ministerio de la honora protektanto dum la kongreso inaĝuro salutas la kongreson. Por la kongresa urbo ĉeestis urbestro prof. d-ro Biallas. Krome estos reprezentitaj multaj registaroj, i.a. Aŭstralio, Belgio, Bolivio, Israelo, Meksikio, Novze-lando, Norvegio, Hispanio, Ciprio.

Laŭ informo de Brita Esperanto-Asocio ankaŭ la brita registaro reprezentitigos en la Hamburga UK: Responde al letero de parlamentano Ernle Money, kiu estas sekretario de la Esperanta Parlamenta Grupo, respondeculo en la Ministerio pri eksterlandaj aferoj respondis jene:.. "Mi estas informita ke stabano de la Ĝenerala Konsulejo en Hamburgo ĉeestis la malferman ceremonion de la kongreso." Per tio la brita registaro estos reprezentita en UK por la unua fojo

Intervjuo radia kun Elsbeth Bormann

Sender Freies Berlin surbendigis intervjuon kun LKK-ano Elsbeth Bormann pri la kongreso. La intervjuo estos disaŭdigita ankoraŭ antaŭ la kongreso.

Favora reago de CDU

Kiel ni jam informis, Germana Esperanto-Asocio transsendis al politikistoj kaj politikaj instancoj la broŝuron de d-ro Werner Bormann "Die Einigung Europas und ihr Sprachenproblem". Inter la respondoj intertempe ricevitaj elstaras tiu de Kristan-Demokrata Partio (CDU), kiu skribis, ke la partio intencas transpreni la en la broŝuro esprimitajn ideojn kaj konceptojn en la partian programon.

Aliĝoj al la UK ankoraŭ eblas

Ĝis nun aliĝis ĉ. 1 700 kongresanoj. Aliĝoj ankoraŭ eblas nun kaj ankaŭ dum la kongreso. Sed la kongresa kotizo nun estas 142,60 GM. Kiu volas ĉeesti la kongreson nur unu tagon, tiu povas aĉeti "tagan bileton" por 15 GM.

La Esperanto-elsendoj

Jam estas feria tempo, do bona okazo aŭskulti al la Esperanto-elsendoj. Pro tio ni hodiaŭ publikigas la horaron de la elsendoj de tiuj stacioj aŭdeblaj en Eŭropo. Ni ankaŭ aldonas la adresojn de la radiostacioj. Aŭskultu kaj skribu!

Ĉiutage Varsovio

06,00 - 06,30 h 31 m, 49 m, 200 m
16,30 - 16,55 h 31 m, 41 m
22,30 - 23,00 h 49 m, 200 m

La detala programo estas publikigita en Germana Esperanto-Revuo 2/1974, same la elsendotempo de Esperanto-anguletoj. Kontraŭ 2 internaciaj respondkuponoj Pilo-Press volonte sendas la koncernan numeron de GER.

Adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O. Box 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando

Dimanĉe

Vieno 06,45 - 06,55 horo 48,74 m (6155 kHc), 41,38 m (7250 kHc)
Aktualaj komentarioj, raporto

Adreso: Esperanto-Redakcio, ORF-Poreksterlanda Servo, P.O. Box 700, A-1041 Wien, Aŭstrio

Sofio 09,30 - 10,00 horo 31 m
21,05 - 21,30 horo 49 m

Informoj el Bulgario, popola muziko

Adreso: Radio Sofie, Esperanto-Fako, Sofio, Bulgario

Romo 21,00 - 21,20 horo 30,90 m (9710 kHc), 41,24 m (7 275 kHc)
50,08 m (5990 kHc)

Informoj el Italio, Kuriero de Esperanto, Leterkesto

Adreso: Radio Roma, Esperanto, Casella Postale 320, I-00182 Roma

Lunde Berno 13,20 - 13,30 horo 31,46 m (9535 kHc), 48,66 m (6165 kH)
75,28 m (kHc)

Felietonoj pri svissaj temoj de d-ro Artur Baur

Adreso: Schweizerischer Kurzwellendienst, Esperanto, CH-3000 Bern 16
La stacio ĵus eldonis sian novan programfolion en Esperanto.

Merkrede Berno 13,20 - 13,30 horo Ondolongoj kiel lunde
Felietonoj pri Esperanto-temoj de
Claude kaj Andrée Gacond

Ĵaŭde Berno 22,45 - 22,55 horo Ondolongoj kiel lunde
Ripeto de la lunda elsendo

Vendrede Zagrebo 00,05 - 00,20 horo 264 m (1163 kHc)
Informoj el Jugoslavio, radiaj artikoloj,
Esperanto-temoj, respondoj al niaj kores-
pondantoj

Adreso: Radio Zagreb, Esperanto-Fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio

Pekino 21,00 - 21,30 horo 43 m, 33, 31 m

Informoj, felietonoj pri ekonomiaj kaj politikaj aferoj,
gazetaj artikoloj, muzikaĵoj

Adreso: Radio Pekino, Esperanto-Redakcio, Pekino, P.R. Ĉinio

Daurigo sur paĝo 3!

Vizitu la librostandon en la kongresejo de la
Universala Esperanto-Kongreso en Hamburgo !

Esperanto-elsendoj (daŭrigo)

Sabate

Vieno 17,45 - 17,55 horo 48,74 m, 41,38 m
La sama programo kiel la dimanĉa

Pekino 21,00 - 21,30 horo 43 m, 33 m, 31 m
Vidu la vendredan programon!

Berno 22,45 - 22,55 horo 31,46 m, 48,66 m, 75,28 m
Ripeto de la merkreda programo

Aŭskultu regule la Esperanto-elsendojn!

Skribu viajn komentojn, kritikojn, proponojn al la koncernaj radio-stacioj!

Radio Bervalio respondas....

Demando: Sub la freŝaj impresoj de futbalmatĉoj Henry Kissinger, la usona ŝtatestretario, konfesis, ke li en siaj knabojaroj en Fürth, Germanio, ludis kiel dekstra avanulo kaj golgardanto. Kiel golisto li estis sensukcesa, li konfesis.... Ĉu pri tiaj sinceraj konfesoj vi povas raporti ankaŭ el Esperantujo?

Respondo: Ni ne povas! La esperantuja situacio ne ŝanĝiĝis sub la futbala impreso. La esperantistoj daŭrigas disputi pri la samaj malnovaj problemoj....

Demando: Ĉu vi povas rakonti ion pri la amovivo de bervaliaj inoj?

Respondo: Ni povus, sed ni ne rajtas! Ni devas esti neŭtralaj rilate al amaferoj. Jen nia konsilo: Informiĝu en la ne-neŭtrala fonto, la nova libro "El la vivo de bervalo sentaŭgulo".

Esperanto en la radio

Radio Varsovio Futbalo ankaŭ regis en la Esperanto-elsendoj el Varsovio dum la pasintaj semajnoj. Speciale impresis la aktualegaj felietonoj de Jerzy Grum tuj post la unuopaj matĉoj de la pola teamo kaj post la dimanĉa finalo. Estas la granda merito de Jerzy Grum kaj de la Pola Radio, ke la sporta lingvo, speciale la futbala pluenevoluis pro la ĉiutaga praktika apliko. Estis vera ĝuo aŭskulti al la grumaj raportajtoj! Ke Pilo-Press iomete modeste kontribuis sur tiu kampo, ni volas ĉe-rande mencii. - Sed futbalo ne forŝovis la aliajn problemojn, politikajn, ekonomiajn, kulturajn. Same daŭrigas la diskutadon pri la nova programskemo la aŭskultantoj. Jen du ĉefaj demandoj:

- 1) Kiam disaŭdigi la Esperanto-Ekspreson? Ĉu dimanĉe vespere kaj lunde matene, kiel nun? Aŭ jam dimanĉe posttagmeze kiel antaŭe?
- 2) Ĉu enmeti muzikaĵojn dum la vortaj elsendoj?
La aŭskultantoj estas petataj skribi siajn opiniojn al la redakcio.

Vieno disaŭdigis sian unuan intervjuon kun itala turisto-esperantisto. Kiel ĉiam interesaj estas la aktualaj komentarioj pri la politika vivo en Aŭstrio de d-ro Alfred Macher. Baldaŭ oni havos la ĝuon aŭdi ankaŭ virinan voĉon el Vieno:

Tapso kaj Tapso en Esperantujo

Postfinalaj konversacioj

Tapso: Kiu nun estas la plej bona?

Tipso: Ĉu vi parolas pri Esperanto aŭ futbalo? Mi aŭdis, ke oni disputas pri tiu problemo ankaŭ en la Esperanto-movado. Laŭdire oni eĉ planas atencion en Esperantujo...

Tapso: Lasu tiun kverelan aferon en Esperantujo! Ni estas ankoraŭ tro freŝaj kaj malspertaj por trarigardi tiun verdan nebulon. Mi parolis pri futbalo kompreneble. Kiu estas la plej bona teamo?

Tipso: Fakte devus esti simpla afero! La finalon venkis FRG kontraŭ Nederlando, kaj do la germana teamo devus esti la plej bona. Sed laŭ mia opinio kun pli da bonŝanco, speciale en la dua duontempo, ankaŭ la nederlandanoj estus povintaj gajni la matĉon.

Tapso: Jes vi pravas! Aliflanke en Pola Radio mi aŭdis, ke laŭ la opinio de la poloj la pola teamo estis la plej bona, ĉar ili ludis la plej elegantan, modern-stilan futbalon. Cetere ankaŭ la monda gazetaro laŭdis la polajn "mirakloknabojn".

Tipso: Ne nur la gazetaro ilin laŭdis, ankaŭ esperantistoj entuziasmiĝis pri ili. En la pasintdimanĉa Esperanto-Ekspreso mi aŭdis kelkajn citaĵojn el leteroj de aŭskultantoj en Nederlando, Skotlando kaj FRG.

Tapso: En la sama elsendo mi aŭdis interesan novaĵon: Jan Tomaszewski, la brila pola golisto, ne nur defendis du punĉotojn, li ankaŭ defendas Esperanton. Komence de junio li eldiris la opinion, ke Esperanton oni devus instrui devige en la lernejoj. Li jam ofte spertis la neceson de tia lingvo kiel Esperanto...

Tipso: La piedpilko estas ronda kaj golejoj estas du... dum la pasintaj semajnoj oni povis ofte aŭdi tiun diraĵon en la Pola Radio kaj ankaŭ la koncerna kanton. Jes la ronda pilko regis la mondon, kaj Andrzej Pettyn, la konata Esperanto-redaktoro de Pola Radio eĉ estis duonmorta pro tiu rondaĵo, ĉar li ne povis sekvi la televidan elsendon pri la matĉo Pollando - Italio en Finnlando.

Tapso: Tamen li reviviĝis kiam li aŭdis en la radio la rezulton...

Tipso: Mi opinias, ke ni nun sufiĉe multe babilis pri futbalo. Kio nun restas el nia babilado en Pilo-Press?

Tapso: Tio estas malfacile por diri, certe ne multo, tamen eble eta guteto... S-ro Aaberg el Gotenburgo en telefana interparolo kun Pilo diris, ke li ĝojis pri la malgranda futbala terminaro publikigita en PP. Li jam uzis ĝin en korespondado.

Tipso: Per tiu esperiga konfeso ni finu nian konversacion pri futbalo kaj ni daŭrigu nian aventurecan vojon tra Esperantujo.

Jarlibro de UEA

Antaŭ kelkaj tagoj aperis la Unua Parto de la Jarlibro de UEA por 1974, kiu entenas la adresaron de la delegita reto.

Parlamentara grupo kreskis

Londono (BEA). Depost la nacia baloto en februaro, en kiu Brita Esperanto-Asocio kampanjis petante subtenon de eventualaj parlamentanoj, la nombro de anoj en la Esperanta Parlamenta Grupo daŭre kreskis. Nun ĝi havas 46 anojn, el kiuj unu, Lord Davies of Leek, estas ano de la supra ĉambro. Tio signifas, ke 7 % de la suba ĉambro jam aliĝis al la grupo. B.E.A. planas lanĉi pluan kampanjon en la venonta baloto, kies daton la Estraro jam antaŭlonge prognozis por septembro 1974.